

ILEI raportas

Raportas la prezidanto kaj la Estraro pri trimonata agado de 2016-01-15 ĝis 2016-04-15.

Eventoj

Venis peto de la Estraro de la pola sekcio de ILEI: maje 2016 en la urbo Wrocław okazos **Interkultura Majrendevuo**. La Estraro de ILEI akceptis la proponon, ke ILEI estu honora patrono de tiu aranĝo. La Prezidanto s-ino Mireille Grosjean sendos salutmesaĝon.

Jaro de la LERNANTO

La lanĉo de la “Jaro de la Lernanto” (JdL) okazos oficiale dum UK en Nitra, julie. Dum februararo estis pridiskutita ene de la Estraro de ILEI logotipo de JdL. Oni ĝin elektis el desegnaĵoj de junuloj, senditaj al la E-pentroarta konkurso okazinta en Italio. IPR publikigis ĝin en sia kovrilpaĝo por 2016/1. Teoria enkonduko en la Jaron de la Lernanto okazos dum simpozio “Nova vojo de lernado”, planota por du lastaj tagoj de la Konferenco. La Estraro nun aktive skizas sian agadon por JdL.

Vivo de la Ligo

Ĉi-jara Konferenco

Daŭras intensa preparado de la 49-a ILEI-konferenco en Nyíregyháza (HU) flanke de la estrarano pri konferencoj kunlabore kun la Loka Konferenca Komitato. Ĝis nun aliĝis 71 konferencanoj el 20 landoj, plej multaj el Hungario (18), Ĉinio (13) kaj Korea Respubliko (11), prezentitaj en la ĉiutage ĝustigata publika listo de aliĝintoj. IPR 2016/1 publikigas du ampleksajn materialojn – pri la konferenca programo kaj la konferenca simpozio. Dume aperis reta mendilo por loĝado, manĝoj, transporto inter UK kaj la Konferenco, kaj konferenca bankedo.

Ĉiuj konferencaj okazaĵoj portas signon de la konferenca temo “Novaj vojoj de lernado”, kiu estos precipe traktata en la ILEI-simpozio okazonta dum la lastaj konferencaj tagoj. La rolon de simpozia programkomitato transprenis la Universitata Komisiono de ILEI. Inter ĝiaj zorgoj estas certigi partnerecon de la Universitato en Nyíregyháza en la simpozio, ĉu kiel kunorganizanto ĉu kiel aŭspicianto, kaj disanonci la simpozion en neesperantistaj universitataj rondoj.

Same kiel en antaŭaj konferencoj, la instruista trejnado (IT) okupos gravan lokon en la konferenca programo:

- En porinstruista trejnseminario estos traktaj kelkaj ĝenerale didaktikaj kaj specife E-metodikaj temoj.
- La seminarianoj povos prezenti siajn provlecionojn en kursoj por komencantoj kaj progresantoj, kiuj same estas planataj en la konferenca programo.
- Estos prezentita programo de MITE (Modula Instruista Trejnado pri Esperanto) pri kiu la prezidantino Mireille Grosjean kunlaboras kun kelkaj fakuloj membroj de germana sekcio de ILEI.
- Diskutrondo pri instruspertoj ebligos al instruistoj el diversaj mondopartoj kaj pedagogiaj tradicioj prezenti kaj interŝanĝi siajn spertojn el E-instruado, kaj al novaj E-instruistoj lerni de ili. Novaĵo en la konferenca programo estos, interalie, Literatura Kafejo. Dume konkretiĝas prelega, kultur-distra kaj turisma partoj de la konferenca programo.

Venontaj konferencoj post 2016

La estrarano pri konferencoj ricevis kandidatiĝon de la sud-korea sekcio de ILEI kun la urbo Busan por la jaro 2017. Por 2018 kandidatiĝis Senegalio. Ambaŭ kandidatiĝoj devas esti kompletigitaj per pliaj informoj antaŭ findecido. La decido pri 2018 dependas ankaŭ de decido de UEA pri UK en 2018; eble eĉ necesos renovigi la konkurson por ILEI-konferenco en tiu jaro.

Komisionoj, sekcioj, reprezentantoj kaj kontaktpersonoj

Estis elektita kaj aprobita de la Estraro pere de voĉdonado la Universitata Komisiono de ILEI, konsistanta el: Duncan ĈARTERS (gvid.), Ivan COLLING, Renato CORSETTI, KIMURA Goro, Ilona KOUTNY, Radojica PETROVIĆ, Kristin TYTGAT. Estrare: GONG Xiaofeng „Arko”. 8 personoj entute.

Estis aprobitaj ene de la Estraro du novaj reprezentantoj (en Senegalo kaj Niĝerlando) kaj du novaj kontaktpersonoj (en Slovenio kaj Srilanko).

Ene de januaro okazis voĉdonado pri 5 novaj sekciestroj. Ĉiuj estis aprobitaj. Nun en la Ligo entute reprezentigas 39 sekcioj, 12 reprezentantoj kaj 19 kontaktpersonoj .

En februaro la Estraro dauxrigis kolekti raportojn pri membrecoj en ILEI-sekcioj. Interalie la Estraro esploris kaj pridiskutis malfacilan situacion en la ukraina sekcio. Por solvi la problemon estis decidite, ke ILEI planu stimuli diversmaniere partoprenon de sudorienteŭropanoj en ILEI-Konferenco, do ankaŭ de la membroj el Ukrainio.

Daŭras kontaktoj de ILEI kun kursgvidantoj de Esperanto tra la mondo.

Nun la Estraro en la persono de la Prezidanto aktive serĉas kontaktpersonon en Ebura Bordo, Madagaskaro, kaj Kamerunio por kunlaboro. Trovita estas kontaktpersono en Turkio kaj en Tanzanio.

Estraro

Ĉiu estrarano havas siajn taskojn kaj faras tion diligente. Ĉeesta kunveno en majo 2016 en Svislando ĉe la prezidanto estas en aktiva preparo; jam solviĝas diversaj viz- kaj veturadzorgoj de la estraranoj. La plano estas kunveni 4 estraranojn (Nadikova, Malanda, Petrovic, Grosjean) kaj kontakti per skajpo la 3 ceterajn (Gong, Colling, Harris).

Regule okazas diskutado, cerbumado kaj voĉdonado pri diversaj farenaĵoj. En la jaro 2016 okazis jam 6 retaj voĉdonadoj.

Estis preparita financa rezulto de la 48-a Konferenco en Oostende fare de la kasisto de ILEI William HARRIS.

Internacia Pedagogia Revuo (IPR)

En IPR 16/1 fare de Radojica Petrović, la estrarano pri konferencoj, kaj Jozefo Nemeth, la ĉefredaktoro, aperis detala priskribo de la programo de la 49-a ILEI-Konferenco en Nyíregyháza kaj bela alloga alvoko por ILEI-simpozio.

Juna Amiko (JA) aperas kvarfoje jare kaj plenkolare.

Post diskuto kun la Afrika Komisiono kaj ties kunordiganto Adjévi ADJE estis proponita de la Prezidanto Mireille Grosjean la listo el 10 afrikaj samideanoj, kiuj ricevos senpagan 5-jaran abonon de JA – danke al subteno de mecenato.

La projekto "Interkulturo" havas novan ĝermon.

Kolegio (Altlernejo) Narupiarara en San-Paŭlo, Brazilo, ĉi-jare enkondukas kursojn de la Internacia Lingvo kadre de siaj liberaj kursoj ekde aprilo kaj petas helpon de ILEI celante disvastigi uzadon de Esperanto per sociaj retoj ĉe Interreto por kultura interŝanĝo inter la kursanoj kaj interesatoj el la tuta mondo - tute kongrue kun la baza ideo de "Interkulturo". La estrarano pri "Interkulturo" komuniĝis kun la kursgvidanto subtene al la iniciato kaj la kunlaboro disvolviĝas.

Membroprizorgado

Daŭras kolekto de raportoj de sekciestroj kaj reprezentantoj tra la mondo. Tiu tasko estas en la manoj de la sekretario Emile Malanda Nianga.

La Koleg-helpa Kaso

Februare okazis voĉdonado ene de la Estraro por kandidatoj por subteno pere de nia Kolegelpa Kaso. Estis aprobitaj 67 kandidatoj. La Prezidanto Mireille Grosjean lanĉis alvokon en IPR, cele al rikolto de mono por la Kolegelpa Kaso (KhK). Fako estas, ke se ILEI membrigas senpage kolegojn, kiuj poste ricevos paperan IPR-n, iu devas kovri la kostojn de presado kaj afranko. Tio estas la celo de KhK.

Respondo al demandoj kaj petoj.

Ĉar venas demandoj/petoj pri disdono de atestiloj al la finintoj de Esperanto-kursoj en diversaj mondopartoj, la Estraro post pridiskuto de la temo kun UEA-estraranoj decidis ellabori taŭgan modelan atestilon por tiuj kursoj por ordigi la situacion. La Prezidanto Mireille Grosjean plenumis tiun taskon. Kompreneble, ne temas pri ŝtate agnoskitaj diplomoj sed pri movadaj atestiloj. Estos nur atestilo, kiu konfirmos, ke iu finis Esperanto-kurson sub gvido de iu instruisto. E-kursfinintoj tra la mondo povos ricevi la samajn atestilojn.

ILEI en la Reto

Funkcias en Facebook la paĝo *“ILEI labortable”*, kaj *“ILEI-konferenco 2016”*. Iliaj membroj januar-aprile pridiskutis la venontan konferencon kaj aliajn kurantajn zorgojn de la Ligo. Bv legi ĉe www.facebook.com. Same funkcias aliaj grupoj ĉe Facebook: *“Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj”*, *“Duolingo Eo Learners”* kaj retgrupoj e-ins, ilei-komitatoj, ilei-sekciestroj-kaj-reprezentantoj, ilei-estraro-plus kaj ilei-nur-estraro. Ankaŭ vizitindas nia retejo www.ilei.info.

Kontaktoj kun movadaj institucioj

Kunlabore kun UEA kadre de la JARO DE LA LERNANTO ILEI preparas AMO-seminaron en Les Brenets, Svislando, la 25-28-n de Majo 2017. Inter la gvidantoj estos D-ino Katalin Kovats, Monika Molnar kaj la Prezidanto Mireille Grosjean.

La Estraro preparas diverspecajn ILEI-prezentadojn dum UK en Nitra. Temas pri ĝiaj budo en la halo, salono por la Tago de la Lernado (plena tago), salono por informprezento de ILEI.

La partoprenantoj de la 9-a Mezorianta Kunveno en Urgupo, Turkio, sendis rekomendon al la estraro de UEA pri instruado de Esperanto en la rifuĝejoj, kie atendas personoj sen cellando. Tiu instruado, se la rekomendo konkretiĝos, okazos kunlabore kun ILEI.

TEJO. La estrarano pri kontaktoj kun TEJO pridiskutis kun la Estraro de TEJO kaj LKK de la Internacia junulara kongreso (IJK) diversajn organizajn demandojn pri seminario por junaj E-instruistoj dum IJK kaj pri partopreno de TEJO-aĝuloj en la Konferenco de ILEI.

CDELI. La 5-an de marto 2016 en la Biblioteko de la Urbo, La Chaux-de-Fonds, Svislando, prelegis la Prezidanto Mireille Grosjean. La temo estis “ILEI, tutmonda Ligo kun gigantaj taskoj”. La artikolo aperos en *KULTURAJ KAJEROJ* de la Asocio Amikoj de CDELI.

Kulturdomo Grezjono. Inter la 9-a kaj 15-a de aprilo Radojica Petrović gvidis tie B2/C1-nivelan kurson por KER-aspirantoj. Tio ebligis ankaŭ prelegi eksterkurse pri kaj varbi por ILEI kaj ĝiaj revuoj kaj konferencoj.

www.edukado.net kaj ĝia gvidanto D-ino Katalin Kovats estas en daŭra kontakto kun Mireille Grosjean; la aktuala temo estas la lanĉo de la program "ekparolu", kies celpubliko estas la komencantoj-komencintoj.

Kontakto kun ekstermovadaj institucioj

La Estraro nun aktive pripensas la partoprenon de reprezentanto de la **Ligo en NRO-konferenco de UN** en Sud-Koreio maje 2016.

Por la baldaŭ okazonta (la 17-an de aprilo) sub la aŭspicio de UEA, **Ĉina Radio Internacia** malferma inaŭguro de la dua filmkonkurso "Teo kaj Amo" en ĉina urbo Hangzhou la Prezidanto Mireille Grosjean sendis sian salut-paroladon. Dum tiu evento, en kiu partoprenos multaj gravuloj en la ĉina kultura kampo, estos prezentita ankaŭ ILEI-logotipo kaj kelkaj fotoj pri kunlaboro de la Prezidanto kun aziaj samideanoj.

UNESKO Rezulto de la kandidatiĝo de ILEI ĉe UNESKO ne ankoraŭ aperis. Venis flanke de UNESKO peto pri du pliaj dokumentoj, kiujn la prezidanto sendis.

Asocio Eŭropa De la Instruistoj (AEDE) Estas serĉataj kontaktoj al tiu asocio, kie ni trovas gekolegojn. Esploroj survojas en diversaj landoj de Eŭropo.

Farendaĵoj

Daŭras preparado de ampleksa tagordo por nia estrarkunsido maja. La ĉefaj temoj estas la skizo de la Jaro de la Lernanto, la ĉi-jara konferenco kaj la projekto "Interkulturo": vigligo kaj renovigo, inter aliaj pli flankaj temoj. Intertempe la kutimaj taskoj rilate al la vivo de la Ligo survojas.

Dankoj

Granda danko, kiel kutime, iras al ĉiuj. Volontule multaj homoj laboras kaj vivtenas la Ligon efike kaj mondscale.

Vicsekretario de ILEI:

Elena Nadikova

Prezidanto de ILEI:

Mireille Grosjean

2016-04-15